CED

English ↓

Deklaro de la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) okaze de la 75-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj

la 10an de decembro, 2023

Okaze de la 75-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de la 10-a de decembro 1948, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) emfazas la historian gravecon de tiu ĉi deklaro kaj atentigas pri la fundamenta rolo de lingvo en la difino, protektado kaj antaŭeniĝo de la universalaj homaj rajtoj.

La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj eksplicite malpermesas diskriminacion bazitan sur lingvo koncerne ĉiujn rajtojn listigitajn en la Deklaracio. Ĉi tiuj inkluzivas egalan protekton sub la leĝo; preventado de arbitra enmiksiĝo kun privateco, familio, hejmo aŭ korespondado; libereco de esprimo (inkluzive de la rajto serĉi, ricevi kaj transdoni informojn kaj ideojn per iu ajn komunika rimedo kaj sen konsidero al landlimoj); egala aliro al publikaj servoj en la propra lando; kaj la ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj esencaj por persona digno kaj libera personeca evoluo. Aldone, la Deklaracio agnoskas la prioritaton de gepatroj en elektado de la speco de edukado provizita al iliaj infanoj. Tamen restas tiel, ke lingvo tre ofte estas la bazo por neegala rekono kaj protekto de homaj rajtoj de individuoj. Parolantoj de minoritataj lingvoj multe pli verŝajne spertas neadon aŭ limigon de tiuj rajtoj surbaze de lingvo.

Dum la Deklaracio restas mejloŝtono en la evoluo de universalaj homrajtaj normoj, multo restas farenda. Estis ripetaj kaj oftaj alvokoj por plifortigitaj iniciatoj de Unuiĝintaj Nacioj por plibonigi la agnoskon kaj protektadon de minoritataj homaj rajtoj, pro la malboniĝantaj kondiĉoj rilate al homaj rajtoj spertataj de multaj minoritataj grupoj tutmonde. Subtenante tiajn klopodojn, ekzemple la Projekton de Tutmonda Konvencio pri la Rajtoj de Minoritatoj, ni krome emfazas, ke lingvaj homaj rajtoj ankaŭ postulas la enkondukon, en ĉiu jurisdikcio, de inkluzivaj, egalecaj lingvaj politikoj, kiuj devus esti regule kontrolataj kaj taksataj.

Ĝisdataj komentarioj kaj rekomendoj por plifortigi la efektivigon de lingvaj homaj rajtoj estis prezentitaj kaj diskutitaj de diversaj internaciaj fakuloj, inkluzive de akademiuloj kaj reprezentantoj de la civila socio, en la 9-a Nitobe-Simpozio, organizita de CED en la Universitato de Torino, Italio, 28-29 julio 2023. Videoresumo de la simpozio estas havebla ĉe https://www.youtube.com/watch?v=37YtQlxnO48

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj - Centre for Research and Documentation on World Language Problems
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando - Netherlands
ced@interlingvistiko.net

CED

Esperanto↑

Statement of the Centre for Research and Documentation on World Language Problems (CED) on the 75th anniversary of the Universal Declaration of Human Rights

10th of December 2023

On the occasion of the 75th anniversary of the Universal Declaration of Human Rights of 10 December 1948, the Centre for Research and Documentation on World Language Problems (CED) emphasises the historical importance of this declaration and draws attention to the fundamental role of language in defining, protecting and advancing universal human rights.

The Universal Declaration of Human Rights explicitly prohibits discrimination based on language concerning all the rights enumerated in the Declaration. These include equal protection under the law; prevention of arbitrary interference with privacy, family, home, or correspondence; freedom of expression (including the right to seek, receive, and impart information and ideas through any media and without regard to borders); equal access to public services in one's own country; and the economic, social, and cultural rights essential for personal dignity and free personality development. Additionally, the Declaration acknowledges the precedence of parents in choosing the type of education provided to their children. Yet it remains the case that language is very often the basis for unequal recognition and protection of people's human rights. Speakers of minority languages are much more likely to experience denial or curtailment of these rights on the basis of language.

While the Declaration remains a milestone in the development of universal human rights standards, much remains to be done. There have been consistent and frequent calls for enhanced United Nations measures to improve the acknowledgement and safeguarding of minority human rights, given the worsening human rights conditions experienced by numerous minority groups globally. While supporting such efforts, for example, the Draft Global Convention on the Rights of Minorities, we affirm that linguistic human rights also require the adoption, in every jurisdiction, of inclusive, equitable language policies that should be regularly monitored and evaluated.

Up-to-date insights and recommendations on enhancing the implementation of linguistic human rights were shared and discussed by various international experts, both academics and civil society representatives, at the 9th Nitobe Symposium, organised by CED at the University of Turin, Italy, on 28-29 July 2023. A video summary of the symposium is available at https://www.youtube.com/watch?v=37YtQlxnO48

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj - Centre for Research and Documentation on World Language Problems
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando - Netherlands
ced@interlingvistiko.net